

Ora Ĵurnalo

Numero 34, Novembro 2020



Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo	2	Poemo de Marjorie Boulton	18
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Pluvo – poemo de Ludwig Zamenhof	19
Espeporko meditas.....	3	Pensu mem! diras Carl-Olof Selenius, Upsalo	19
La bildo sur la unua paĝo montras Kronhuset, Gotenburgo	4	La ŝlosila harpo	21
Celebro de la tri-jara Ora Ĵurnalo.....	4	Dek ses tunojn – Olivier Tzaut.....	23
Gratulon, Ora Ĵurnalo!.....	6	Solidareca Bonvolo.....	23
La UN-tago en la preĝejo de Brunnsbo, Gotenburgo	6	”La voĉo de la surda lingvo” gajnis la premion.....	26
Pacpremio al Dag Hammarskjöld en 1961 kaj al UN en 2020	8	Ho, belulin' !.....	26
La balado pri la blua vaska ĉap’.....	9	Kultura Esperanto-Festivalo 2022 en Svislando	27
En Göteborgs-Posten la 6an de novembro en 2020	10	Mireille Grosjean: ILEI-kongreso	27
Gotenburgo estas konata en Svedio pro la aparta humuro de la enloĝantoj	10	Celo de Eŭropa televidkanalo en Esperanto	28
Liberec’.....	11	Rezultoj de la Literatura Konkurso ”HRISTO GOROV”	29
MEMORAĴOJ de Lenke Szász, Rumanio.....	12	Sten Johansson: Sesdek ok	29
Tri poemoj de Dag Hammarskjöld	13	Greta Thunberg skribas al Donald Trump en Twitter.....	30
La tempo de relbuso de Harriet Lindskog	14	Bertil Nilsson informas pri la Konsilio de Eŭropo.....	30
Portreto de fama persono	16	Hundo sen mastro	32
1997-09-23 – El la gastlibro de Inga Johansson	18	Aŭtunaj hajkoj	33

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com.
Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





Espeporko meditas



- ☆ Mi cerbumas pri la UN-tago. Kial mi ne vidis multajn flagojn la 24an de oktobro?
- ☆ Kial estis debato pri la balado pri la blua vaska ĉapo (de UN-dungito). Kelkaj pensis ke la balado ne estis serioza. Oni bezonas himnojn! Sed kial ne ambaŭ: kaj himnoj kaj popularaj kanzonoj?
- ☆ Sen UN la mondo certe estus pli mizera, ĉu ne? Do, aŭskultu la aldan voĉon de Anita Lindblom kantante "La balado de la blua vaska ĉapo".
- ☆ Malgraŭ la korona pandemio ni en oktobro havis la jenajn eventojn: 1) ni celebris la tri-jaran jubileon de Ora Ĵurnalo, manĝante torton en parko, 2) ni lernis pri la famaj personoj, kiuj havas siajn nomojn en oraj literoj sur roko kaj 3) ni ĉeestis je naskiĝfesto en preĝejo per kantado de la esperanta himno. Christin Granat ludis la trumpeton.
- ☆ Nostalgiajn artikolojn skribis Lenke pri valoraj memoraĵoj kaj Harriet skribis pri la iama relbuso.
- ☆ "Sesdek ok", nova libro de Sten Johansson pri la okazaĵoj en 1968 fare ĉefe de la studentoj. La temoj de liaj libroj ampleksas multon kaj estas tre variaj. Fine de Ora Ĵurnalo estas novelo de Hjalmar Söderberg, tradukita en esperanton de Sten Johansson.

- ☆ Sabate vespere (7/11) estis klare ke Joe Biden estos la nova prezidento de Usono. *Gratulon!*
- ☆ Marjorie Boulton ne plu vivas, sed ŝiaj verkaĵoj vivos eterne! Inga Johansson gastigis ŝin en 1997. Boulton ankaŭ vizitis UK:n en Gotenburgo en 2003.
- ☆ Muziko ĉiam estas karakteriza marko de la familio Granat. Ĉi tiun fojon Lasse skribis pri sia "ŝlosila harpo", eble ne tre konata ekster Nordio.
- ☆ Carl-Olof Selenius meditas pri la valoro havi tiom da ciferoj prezentataj en komunikiloj, ekz. koncerne la klimatan minacon. Milionoj aŭ miliardoj ŝajnas sensencaj. Li diras: "Pensu mem!"
- ☆ Mi ankaŭ enmetis foton de Greta Thunberg. Ŝi ne ofte ridas sur foto, sed kiam ŝi en Twitter adresas Donald Trump admonante lin esti trankvila, ŝi vere ridetas.
- ☆ Gravas ke Esperanto havas influon al lingvaj aferoj, kiujn la Konsilio de Eŭropo traktas.
- ☆ La venonta numero de Ora Ĵurnalo estos la Kristnaska numero. Limdato por manuskriptoj estas la 5an de decembro.



/Siv



La bildo sur la unua paĝo montras Kronhuset, Gotenburgo

Ingegerd fotis en momento, kiam ne troviĝis aŭtoj sur la korto.

Kronhuset, La Krondomego, estas unu el la plej malnovaj domoj de Gotenburgo, konstruita meze de la 17a jarcento en nederlanda stilo. Tiam oni uzis ĝin kiel stokejon por la milituniformoj kaj por aliaj militiloj.

Je tiu tempo Svedio militis kontraŭ Danio kaj la bezono de stokejo estis granda.

Kiam la parlamento kolektiĝis en Gotenburgo Kronhuset servis kiel parlamentejo. Pli poste ĝi estis uzata kiel garnizona preĝejo ĝis 1898.

Multaj malgrandaj domoj estis konstruitaj apud Kronhuset. Kelkaj forbruliĝis, sed estis rekonstruitaj. La okcidenta domvico enhavis ĉarojn kaj stokejojn. La orienta vicdomo

servis kiel armilforĝejo, tornilejoj kaj selistejoj.

Nuntempe la loko estas viva centro por metiistoj. Mi rekomendas viziton al la Krondometoj! Oni povas ekz. butikumi en malnovstila nutraĵvendejo kaj spekti vitraĵfaristojn laborantajn. Troviĝas juvelforĝado, potfarado, farado de ledaĵo, saĝo k.t.p.

La granda Kronhuset servas kiel koncertdomo.

Kontakto

Adreso: Kronhusgatan 1D

Haltejo: Brunnsparken

Retpaĝo: <http://kronhuset.se>

/Siv

Celebro de la tri-jara Ora Ĵurnalo

en la parko de S.A. Hedlund, Gotenburgo, la 17an de oktobro. Roger fotis.

La ideo elekti tiun lokon devenis de Margareta. Post la festo ŝi kaj Jan gvidis nin ĉirkaŭ la lageto. La familio Granat preparis kafon. Ni estis 11 personoj, sed la torto ankaŭ sufiĉis al kelkaj preterpasantoj, eĉ infanoj.

Ingegerd donis al ni informon pri S.A. Hedlund kaj liaj gastoj, kies nomojn vi povas legi sur la roko. La nomoj de





kelkaj virinoj troviĝas apude. Vi povas legi pri S.A. Hedlund kaj Viktor Rydberg en numero 13 de Ora Ĵurnalo, paĝoj 15–17.



Christin kaj Ingrid.
Margareta kaj Jan.



La "gastlibro" de S.A. Hedlund.



La frontpaĝoj de la novembraj numeroj de Ora Ĵurnalo ekde numero 1 en novembro 2017 ĝis hodiaŭ.

*Gratulon,
Ora Ĵurnalo!*

*Venis de Elvira el
Gdansko*

*Koran Dankon!!!
diras
Ora Ĵurnalo*



La UN-tago en la preĝejo de Brunnsbo, Gotenburgo



Margareta Andersson promesis, ke esperantistoj kantas je la 60a naskiĝtago de viro, kies patron Margareta konis. Bona ideo!

Ankaŭ aliaj personoj ofertis kantojn kaj poemojn en diversaj lingvoj. Ĉiuj temis pri paco, ĉar tio estis la deziro de la jubileulo.

Unue ni esperantistoj estis en vico. Margareta deklamis la Esperantan himnon svede kaj poste Christin ludis la trumpeteton kaj Lasse kaj mi kantis.



Margareta, Lasse kaj Christin en koncentrita atendo. Sekvis poemoj en la ĉina, en la hinda, en la araba, en la finna, en la greka.... (la subaj bildoj en la sama ordo).

Ni estis invitataj partopreni en hinda kurso, sed ni diris – Ne, dankon, la tempo ne sufiĉas. Tamen la hinda elparolo estas tre dolĉa kaj klara. /Siv



Pacpremio al Dag Hammarskjöld en 1961 kaj al UN en 2020



Dag Hammarskjöld (1905–1961)

ricevis la pacpremion de Nobel pro sia pacŝirma laboro.

Li ekzameniĝis en 1925 ĉe Uppsala Universitato, i.a. pri historio, lingvistiko kaj literaturo.

Plia studado rezultis en ekzamenoj pri ekonomio kaj juroscienco. Li doktoriĝis pri ekonomio en 1934.

En 1953 li estis elektita ĝenerala sekretario de UN por kvin jaroj kaj por plia periodo ekde 1957.

Kiel ĝenerala sekretario li laboris por igi UN:n pli memstara kaj pli politike aktiva.


Post la sukcesa solvo de la Suez-krizo en 1956 li starigis la unuan pacbrigadon. Li enmetis novan metodon por solvi konfliktojn – "La ĉeesto de UN en ĉiu konflikto".

Dag Hammarskjöld havis multajn talentojn. Li ankaŭ estis verkisto, tradukisto kaj membro de la Sveda Akademio. Lia patro antaŭe havis tiun membrecon.

Li mortis en aviadila averio en Nord-Rodezio (hodiaŭ Zambio) dum provo solvi la Kongo-krizon. Longtempe oni cerbumis ĉu estis akcidento aŭ murdo.

La saman jaron li ja post la morto ricevis la Nobel-premion pri la paco.

Post la morto de Dag Hammarskjöld en septembro 1961 oni trovis en lia loĝejo en NovJorko manuskripton nomatan Vägmarken – Vojsignoj – "Intertraktado kun mi mem kaj Dio". Tiu libro estas hodiaŭ klasika libro, tradukita al multaj lingvoj (la bildo dekstre).



La Unuiĝintaj Nacioj fondiĝis post la dua mondmilito kaj nun ĝi celebras sian 75an naskiĝtagon.

La Nobel pacpremio estos donita al UN en 2020, aŭ pli precize al ĝia nutraĵa programo WFP (World Food Programme). Estas rekono

al ĝia grava internacia kunlaboro liveri nutraĵojn – kaj dum "normalaj tempoj" kaj dum konfliktoj – al homoj kiuj bezonas helpon.

*La teksto estas kunmetita el Interretaj fontoj.
/Siv*

Legu kelkajn poemojn de Dag Hammarskjöld en paĝo 13.



La balado pri la blua vaska ĉap' Balladen om den blå baskern

(Ballad of the green barret)

Melodio: Barry Saddlke /Robin Moore

Sveda teksto Lasse Berghagen. Tradukprovo: Siv kaj Andreas

En Youtube: <https://www.youtube.com/watch?v=SKlvo9mrHH8>

Krig och död, ett fjärran land
gråt och svält, ett land i brand.
Men i sken från en handgranat
i basker blå stod en svensk soldat.

Han kom dit från ett land i nord
att få slut på krig och blod.
Reste hit från sin fästemö
reste hit för att kanske dö.

Han kom dit för att skapa fred
skapa fred i ett land som led.
Som en vän var han alltid sedd
och var för ung för att vara rädd

Läppar dog, som kvinnor kysst
blod och eld, se'n blev han tyst.
Men i sken från en handgranat
i basker blå stod en svensk soldat.

Så en dag kom det ett brev
och i det hans fästmö skrev:
Vad som än sker, så finns jag här
och du vet att jag har dig kär.

Krig och död, ett fjärran land
gråt och svält, ett land i brand.
Men i sken från en handgranat
i basker blå stod en svensk soldat.

Milit' kaj mort', en fora land,
malsat' kaj plor' en fajra land'.
Sed en lum' de la mangrenad'
en vaska ĉap' staris svedsoldat'.

De hejm' en nord' li venis por
la militon fini do.
Venis de sia fianĉin'
por ebla sort' de morta fin'.

Por krei pacon venis li
land' suferas de l' milit'.
Ja amik' oni taksis lin
kaj timi li ne permesis sin.

Lip' kisita de virin'
ĉesis vivi en la fin'.
Sed en lum' de la mangrenad'
en vaska ĉap' staris svedsoldat'.

Fine venis la mesaĝ'
skribis fianĉin' sur paĝ':
Mi atendos vin, kredu min,
kaj vi scias: mi amas vin!

Milit' kaj mort', en fora land',
malsat' kaj plor' en fajra land'.
Sed en lum' de la mangrenad'
en vaska ĉap' staris svedsoldat'.

Kantas la sveda kantistino Anita Lindblom.

En Göteborgs-Posten la 6an de novembro en 2020



En Gotenburgo oni manĝas Gustav Adolf-tortetojn, memore al la morttago de la reĝo en 1632. Li ja fondis la urbon. Ankaŭ svedlingve parolantaj homoj en Finnlando celebras la tagon.

Hodiaŭ oni eklumigis Brunnsparcken /la Putparkon/ per granda brila koro. Lastjare paroj geedziĝis antaŭ la koro.

Gotenburgo estas konata en Svedio pro la aparta humuro de la enloĝantoj



En la kanalo ĉe la urba domo troviĝas leterkesto kun la simbolo de la urbo kaj la teksto "Plendo pri la urbo". Sed ne estas la administracio kiu metis ĝin tien. Estas la societo "Funktionsrätt i Göteborg" (Funkcia rajto en Gotenburgo) kiu volas atentigi homojn pri la malfacileco atingi la regantojn pri plendendaj aferoj. La societo dismetis similajn leterkestojn en malfacile atingeblajn lokojn en la urbo. La urbaj regantoj akceptas la humuran agon, sed post semajno oni forprenos ilin. Do, gotenburganoj, tuj trovu la aliajn leterkestojn ĉe Stenpiren, Avenyn, Kungsporsplatsen kaj Järntorget.

Post la manifestado eble la gotenburganoj pli facile atingos la regantojn.

Liberec'

Inga sendis kanzonon de Ĵomart

<https://www.youtube.com/watch?v=sVLd4edz88I>



Ĵomart:

Ekde kelkaj lastaj jaroj,
kiam ni partoprenas en
iu e-aranĝo, ni ĉiam
faras donacon al
esperantistoj de tiu
lando kie okazas la
aranĝo.

Ni tradukas iu popularan kanton de la lando
kaj prezentas ĝin dum nia koncerto.

Ĉi-jare ni estis invititaj al la Itala Esperanto
Kongreso, sed okazis la pandemio... Do, jen la
kanto kiun ni donacas, nun ne nur al la italaj
esperantistoj, sed ankaŭ al ĉiuj aliaj. Estas
traduko de iam fama itala kanto "Libertá".

Se vi ŝatas la muzikon, mi petas aboni al nia
kanalo kaj premi la butonon "Ŝatas". Dankon!

https://auskultu.click/Ĵomart_Nataŝa

<https://jomart.click/Subteni-ĴN>

(el Facebook)

Liberec'

Vespere falas peze sur la ŝultroj, kaj viro foriras
Nokto silentas kaj sekreton li portos en sia kor'
Inter la domoj kaj preĝejoj vane serĉas virino
Kiom da homoj ne revenos je via nom'.....

**Liberec' kiom multe ploris vi
Kaj sen vi regas en la mond' solec'
Dum en viv' restas senco kaj esper'
Vivos mi por la liberec'
Liberec' kiam voĉoj en korus'
levos sin kaj kantos nur por vi**

Daŭre multiĝas doloro kaj mizero surtere
Kreskas ĉiutage cinikismo kontraŭ simplaj homoj
Sed suno naskiĝas en la nokt', en la kor' de malfortuloj
Kaj en silento denove naskiĝas am'
Serĉante vin!

Liberec'.....

MEMORAĴOJ de Lenke Szász, Rumanio



La tre ŝatata hungara verkistino, Janikovszky Éva skribis ie, ke la homoj apartenas al du kategorioj: 1) kolektantaj, ĉion konservantaj kaj 2) forĵetantaj ĉiajn "senvalorajojn".

Do, la unua kategorio de homoj estas tiuj, kiuj ne forĵetas la senutilajn aĵojn, ĉar ili rememorigas okazintaĵojn aŭ karulojn el la pasinta tempo.

La dua kategorio de homoj forĵetas ĉion "senvaloran", senutilan. Sentimentalan valoron ili ne konas.

La verkistino konfesas, ke ŝi apartenas al la unua kategorio, al tiu de ĉion konservantaj.

Ankaŭ mi apartenas al tiu kategorio kaj ankaŭ miaj gepatroj estis tiaj.

Mi heredis de ili ne nur malnovajn atestilojn pri naskiĝoj aŭ mortoj, lerneajn atestilojn, malnovajn fotojn, feran gladilon varmigitan per karbo ktp. Alia kategorio, tiu de pedantaj

virinoj, ĉiam purigas kaj forĵetas ĉion senutilan.

Mia apartamento ne montras la signojn de pedanta virino. Ĝi estas plena ne nur per libroj sed ankaŭ pri tute "senutilaj" aĵoj. Mi komencu kun la plej malnovaj.

Mia patrino konservis eluzitan ladan skatoleton en kiu iam estis papriko el Szeged. Tiu urbo en Hungario famiĝis pri la produktado de papriko. Mia avino lernis en tiu urbo antaŭ la unua mondmilito, en akuŝistina lernejo.

Mi kredas, ke tiu skatoleto memorigis al ŝi la urbon de ŝia junaĝo. Mia patrino heredis la skatoleton, kaj mi heredis ĝin de ŝi. Tiu eluzita skatoleto kun ruĝaj paprikaj desegnitaj sur ĉiuj flankoj estis farita iam fine de la deknaŭa jarcento. Mi amis tiun avinon, patrinon de mia patrino, ĉar ŝi laŭtleĝadis al

mi kortuŝajn historietojn, kiam mi ne sciis ankoraŭ legi.

Mi konservis ankaŭ parfumujon de mia patrino krom fotoj pri ŝi. Patrino recitis al mi belajn poemojn lernitajn de ŝi en la lernejo. Ŝi naskiĝis en kamparana familio, kaj finis nur la tiam devigajn ses klasojn de la vilaĝa lernejo. Foje ŝi konfesis, ke ŝi deziris plu lerni, sed tion ne permesis la modesta materia stato de la familio. Sed ŝi legadis dum la tuta vivo, havis modestan bibliotekon kaj aĉetis ankaŭ la plej deziritajn de mi librojn.

Mia patro lernis por fariĝi tajloro, mi konservas lian atestilon ricevitan fine de la metilernejo. Ne multajn objektojn mi heredis de li, sed mi memoris por ĉiam lian instruon: "La honoro pli gravas". (ol la materia gajno).

Pli novaj memoraĵoj konservitaj de mi estas leteroj, fotoj de miaj esperantistaj geamikoj, libroj kaj bildkartoj ricevitaj de ili. Mi konservis ĉiujn leterojn de Marjorie Boulton, tiujn de la francaj geedzoj Colin. Ili gastigis min trifoje post la reĝimŝanĝo, kiam fariĝis permesata viziti ankaŭ "kapitalisman" landon. Mi konservis leterojn de serba, brazila fidelaj leteramikoj. Niaj korespondadoj finiĝis post iliaj forpaso. Pluraj skatolegoj plenas de bildkartoj kaj leteroj de esperantaj geamikoj.

Kaj mi menciu ankaŭ la ujojn plenajn de ŝtonetoj kaj konkoj kolektitaj en franca kaj greka marbordo. Ili entenas feliĉajn horojn pasigitajn borde de azuraj maroj, sub bluegaj ĉieloj, kiam realiĝis mia infana deziro – vidi la maron, pri kiu mi legis en la romanoj de Jules Verne.

Kiun el tiuj kolektiĝintaj "fatrasoj" mi elĵetu?

Mi estas sola, jam ĉiuj kuŝas en tomboj, kies memoron mi konservas. Sed tiuj memoraĵoj riĉigas mian vivon, mildigas mian solecon. Ĉu miaj genepoj forĵetos ilin aŭ la plejmulton de ili?

Mi komprenas, ja ne eblas fari muzeon en blokdomo, en malvasta apartamento. Ili ne konis miajn geavojn, miajn gepatrojn, miajn geamikojn, miaj memoraĵoj al ili diras nenion. Mi esperas, ke ili konservos tamen kelkajn objektojn kiuj memorigas ilin pri avino, pri mi. Mi ŝatus, ke ili konservu la librojn tradukitajn de mi, la poemojn kaj rakontojn skribitajn de mi. Eble la memoraĵoj ankaŭ iliajn vivojn pliriĉigos.

Lenke Szász

Aldono de Siv: La skribilujon mi memoras. Mi havis similan kiam mi estis bazlernejano – kaj mi ankoraŭ retenas ĝin.

Tri poemoj de Dag Hammarskjöld

La sezonoj varias
kaj la lumo
kaj la vetero
kaj la horo.

Sed estas la sama lando.

Kaj mi komencas koni la mapon
kaj la veterdirektojn.

Daŭre demandanta
mi jam estos ĉe la celo,
kie la vivo sonoras –
klara simpla tono
en la silento.

Vi neniam revenas.
Alia viro
trovas alian urbon.

*Tradukis:
Andreas Nordström*



La tempo de relbuso de Harriet Lindskog

Den var lika gulorange, som jag mindes den. Undångömd bland antika sotsvarta lok och rostiga kupévagnar, stack den ut likt ett utropstecken i en dyster berättelse i järnvägens historia.

Stor-fin-gul-bussen! Men inte platsade den väl bland alla gamla lok? Det var ju inte längesen jag åkte rälsbuss från realskolan i Sorsele? Smaken av Madeleinekakor kunde få Proust att minnas sina barndomstrakter i Frankrike och nu förde åsynen av den orangea bussen mig tillbaka till 50-talet i Lappland.

Det är lördag och vi har bara en lektion kvar – engelska för magister Burman.

Hoppas att han låter mig gå en kvart tidigare! Då hinner jag nog med rälsbussen hem.

Jag vet att mamma har lagat något extra gott och väntar på mig.

Och jag har lydigt städat mitt hyres rum och den långa trappan som värdinnan för mitt inackorderingsrum har krävt. Hon har själv kontrollerat att det är riktigt gjort genom att stryka med handen på golvet. Jag vågar inte riktigt tala om hemma hur mycket jag vantrivs hos familjen Ruong som använder oss inackorderingar som något slags

Ĝi estis same flavoranĝa, kiel mi memoris ĝin. Kaŝita inter antikvaj fulgonigraj lokomotivoj kaj rustaj kupeovagonoj, ĝi estis elstara kiel ekkria signo en morna rakonto pri la historio de la fervojo.

Granda nobla flava buso! Sed ĝi certe ne trovus lokon inter ĉiuj malnovaj lokomotivoj? Estis ja antaŭ nelonge kiam mi iris per relbuso de la mezgrada lernejo en Sorsele? La gusto de Madeleinkukoj povis igi Proust memori siajn infanecajn regionojn en Francio kaj nun rigardi la oranĝan buson venigis min reen al la 50aj jaroj en Laponio.

Estas sabato kaj restas por ni nur unu leciono – la angla de sinjoro instruisto Burman.

Mi esperas ke li lasos min fini kvaronhoron pli frue! Tiam mi ne maltrafu la relbuson hejmen.

Mi scias ke patrino kuiris ion aparte bongustan kaj atendas min.

Kaj obeeme mi purigis mian luĉambbron kaj la longan ŝtuparon, kion la estrino de mia pensionĉambro postulis. Ŝi mem kontrolis ke estas ĝuste farita per glatigi la manon sur la planko. Mi ne tute kuraĝas diri hejme kiam mi malkomfortas ĉe la familio Ruong, kiu uzas nin pagantajn gastojn, kiel purigistajn

städslavar, trots att vi betalar fullt pris för rummet.

Det går väl an för min rumskamrat Monika som är 15 år och nästan vuxen, tycker jag som bara är nyss fyllda 12.

Jag är också yngst i klassen eftersom jag hoppat över en årskurs och börjat i andra klass i realskolan-skulle väl motsvara åttan på högstadiet nu.

Men på 50-talet i norrländska skolor tas inga hänsyn till elever som måste bo borta från hemmet under veckan Många i klassen kommer från de små lappländska byarna och är inackorderade i Sorsele under skolveckan Då gäller det att sköta sig och äta den mat som serveras.

Magister Burman har förberett en lappskrivning denna sista timme på lördag och jag hinner inte med första bussen hem utan blir tvungen att vänta flera timmar extra.

Men då kan jag i alla fall lyssna på Sveriges Bilradio på min lilla transistor Om jag har tur så spelar man en riktig rock-låt med Elvis eller Bill Haley –Det är den enda chans som finns att höra den nya musiken-annars gäller schlagers och marschmusik i utbudet.

Äntligen hemma i den lilla byn! Den snälle rälsbussföraren släpper av mig efter järnvägsbron så jag inte behöver gå den långa vägen över isen på Juktån.

Men helgen är kort! Pappa som är byns skollärare envisas med att hjälpa mig med matten-vilket säkert behövs, särskilt som jag hoppat över en klass!

Men jag är otålig och skriker att han förklarar dåligt.

Detta kommer förstås tillbaka som ” karma ” när jag ska hjälpa mina barn med läxorna 30 år senare.

Söndagskvällar är det värsta jag vet! Förmodligen hänger det ihop med att det då var dags att åka tillbaka till inackorderingsrummet och skolan Jag hade att välja på att åka en rälsbuss sent på söndag

sklavojn, malgraŭ ke ni pagas plenprezon por la ĉambro.

Decas por mia samĉambranino Monika, kiu havas 15 jarojn kaj estas preskaŭ plenkreska, mi, kiu ĵus fariĝis 12-jara, pensas.

Mi ankaŭ estas la plej juna en la klaso, ĉar mi preterlasis unu studjaron komencinte en la dua klaso en la mezlernejo – devus esti analoga al la 8a en la supera stadio de la baza lernejo nun.

Sed en la 50aj jaroj en norrlandaj lernejoj oni ne respektas lernantojn, kiuj devas esti for de la hejmo dum la semajno. Multaj en la klaso venas de etaj laplandaj vilaĝoj kaj estas enpensionigitaj en Sorsele dum la lernejsmajno. Do gravas bone konduti kaj manĝi la manĝaĵon surtabligitan.

Instruisto Burman preparis skriban ekzamenon ĉi tiun lastan sabatan lecionon kaj mi maltrafas la unuan buson hejmen, kaj estos devigita atendi plurajn ekstrajn horojn.

Sed tiam mi almenaŭ povas aŭskulti la Svedan Aŭtoradion per mia eta transistoro. Se mi estos bonŝanca oni ludos veran rokmelodion kun Elvis aŭ Bill Haley. – Estas la sola estanta ŝanco aŭskulti la novan muzikon – alie oni ofertas nur modkantojn kaj marŝmuzikon.

Finfine hejme en la eta vilaĝo! La afabla relbuskondukisto lasas min eliri post la fervoja ponto, por ke mi ne devu iri la longan vojon sur la glacio de Juktån.

Sed la semajnfino estas mallonga! Patro, kiu estas la vilaĝa instruisto, persistas helpi min pri la matematiko, kio ĉerte estas bezonata, aparte ĉar mi preterlasis unu klason.

Sed mi estas senpacienca, kriante ke li malbone klarigas.

Tio kompreneble ja revenas kiel ” karma ”, kiam mi helpos miajn infanojn pri la hejmtaskoj, 30 jarojn pli poste.

Nenio estas pli malbona ol dimanĉaj vesperoj Verŝajne ili estas ligitaj al la fakto ke kiam estis tempo reveni al la pensiona ĉambro kaj la lernejo. Mi devis elekti iri per relbuso

eller vänta till måndag morgon och åka "kruttåget" på egen risk.

Den mycket speciella lukten av sot och det tuffande ljudet av tåget när det bokstavligen ångade in på stationen med den svarta röken bolmande ur skorstenen är en upplevelse som dagens ungdomar bara sett på film.

Så det är kanske inte så konstigt att jag fortfarande tycker att den rälbusen känns ny och modern. Att finna en sådan på ett järnvägmuseum får mig att tänka att också jag är antik.

Men nu fattar jag mod och tänker att "vår tid är nu".

Bilden: Harriet Lindskog, deltar i en hattparad i Polen, en mycket trevlig resa, som Göteborgs Esperantoförening arrangerade. Med rälsbuss åkte vi inte den gången utan vi seglade ner med ett rosa flygplan.

malfrue dimanĉe aŭ atendi ĝis lundmatene kaj iri per "la pulva trajno" je la propra risko.

La tre aparta odoro de fulgo kaj la murmura sono de la trajno, kiam ĝi vapore enveturis en la stacion kun la nigra fumo elirante de la fumtubo, estas sperto, kiun la hodiaŭa junularo nur vidis en filmo.

Do, ne estas strange ke mi daŭre pensas ke la flav-oranĝa relbuso faras novan kaj modernan impreson. Trovi tian en fervojmuzeo, igas min pensi ke ankaŭ mi estas antikva.

Sed nun mi kuraĝigas min, pensante, ke "nia tempo estas nun".



La bildo: Harriet Lindskog partoprenas en ĉapelparado en Pollando, tre agrabla vojaĝo, kiun aranĝis la Esperanto-Societo de Gotenburgo. Per relbuso ni ne iris tiam, sed "veladis" per rozkolora aviadilo.

Portreto de fama persono



Marjorie Boulton naskiĝis la 7an de majo en 1924 kaj mortis la 30an de aŭgusto en la jaro 2017. Ŝi estis brita verkisto kaj poeto, kiu verkis kaj en la brita lingvo kaj en la esperanta lingvo. Kiam Marjorie studis en Oxford ŝi havis CS Lewis kaj JRR Tolkien kiel instruistoj. Ŝi kandidatiĝis por la Nobel-premio de literaturo en la jaro 2008. Marjorie agis kiel instruisto kaj rektoro en la altlernejo dum multaj jaroj pri la angla literaturo antaŭ ol ŝi komencis verki plentempe. Marjorie Boulton estis bone konata verkisto en esperanto. Ŝi ankaŭ estis prezidanto de du esperantaj organizoj, "Katamikaro kaj ODES- Esperanto-Societo de Oksfordo kaj Distrikto. Memoru Marjorie Boulton kiel granda lingva eminentulo!

/Ingegerd

Triminuta komento pri la poeto Marjorie Boulton, kun legado de unu ŝia poemo:

<https://www.youtube.com/watch?v=OHohhMPr06M>

Pri persona kontakto kun Marjorie Boulton. Inga Johansson skribas:

Certe mi legis libron de Marjorie Boulton, jes, ja Faktoj kaj Fantazioj. Tiun libron mi pluruzis dum lecionoj, ĉar estas en la libro kelkaj gramatikaj perloj. Ekz. Versareto pri la Akuzativo; Versareto pri Korelativoj; kaj pri iĝ kaj ig. Estis do memorenda momento kiam la verkistino vizitis min en septembro 1997.

Ni vidis la urbon, vizitis mian laborejon, la urban bibliotekon, kaj butikumis. Mi estis membro de Pasporta Servo kaj ŝi estis mia sola gasto en septembro.

Dum mi preparis manĝon en la kuirejo, Marjorie preparis sin hejme en la gasta ĉambro. Subite mi aŭdis ian strangan interparolon, kaj mi tutcertis ke mi enigis nur

unu gaston. Mi ne vidis, nur aŭdis. Iom poste Marjorie venis al la kuirejo kaj petis pardonon, ŝi forgesis ke ŝi ne estis en sia hejmo, kaj tial ŝi interparolis.

En la kuirejo ŝi komforte sidis en mia blua sofo kun sia bunta vestaĵo, kaj mi do povis foti ŝin, laŭ mi la plej bonaj fotoj iam. Vi povas kompari aliajn fotojn rete. 1997 ŝi havis 73 jarojn.

En 2003 Marjorie partoprenis en la UK-88 de Gotenburgo. Tiam ŝi kongrese kaj hotele loĝis kaj ni ne havis kontakton. Sed fotoj de kongreso montras ke ŝi renkontis kaj Tonkin kaj la Nepo Zamenhof, certe tre grave, ĉar ŝi skribis biografion pri lia fama avo.



La nepo de Zamenhof kaj Marjorie Boulton renkontiĝas.

La renkonto kun Tonkin UK-88 Gotenburgo 2003.



1997-09-23 – El la gastlibro de Inga Johansson

Marjorie Boulton desegnis sian dekstran manon kaj skribis:

*Mia dekstra mano, per kiu mi verkis neniun linion. (Mi estas maldekstramana...)
Portreto de multe uzita "kalikamesilo" – ?
(Via serĉo – **kalikamesilo** – ne kongruas kun iuj ajn dokumentoj.)*

La manskribo de Marjorie Boulton oni malfacile legas, sed ŝi skribas:

Mi tre kore dankas I.J. por tre konsiderema malavara kaj temporaba helpado al mi dum

mia vizito al Gotenburgo la 21-an ĝis 24-an de septembro 1997. Ŝi ege malŝpare donacis sian tempon por nutri min, helpi min pri aĉetoj, gvidi min al kunsidoj kaj montri al mi la eminentan urban bibliotekon.

Angle: I like swedes, especially mashed with a little butter. I like Swedes when they are as they often are kind, patient and helpful like Inga. (But I would never boil her and add butter!)

Esperante:

Foriros mi kun gest' mansvinga
de la gastama pord' de Inga
Forka labor', kulera, klinga
abundas en la hejmm' de Inga
Ŝi helpis min pri aĵo Ming-a
inteligenta far' de Inga
Do, taŭgos danco salta, ringa
Por danko kaj gratul' al Inga

Oksforda piednoto: Ming-a: kiam mi aĉetis medalionon de Ming-dinastia porcelana ero, muntita por mia kat-kuratorino.

Alia noto pri piedoj: mi ne kapablas danci, tamen

*Amike kaj danke,
Marjorie Boulton 1997-09-23*

Poemo de Marjorie Boulton

Jen mia propono,
sinjoroj kaj kamaradoj:
lokigu la venontan konferencon,
kie ĝi tuŝas vian konsciencan.
Ne post imponaj fasadoj,
kun ĵurnalistoj en balkono:
aranĝu ĝin ĝia kuŝ-hospitalo
Morgaŭ miregos en ĵurnalo:
"Finfine ĉiuj ŝtatestroj scias,
ke homa vivo kostas iom pli
ol ŝtatestroj kutime opinias".
Jen pacpropon' de ordinara mi.

Poemo kiun la itala kantisto Gianfranco Molle registrigis en julio 2018. Li mortis en decembro la saman jaron:

<https://www.youtube.com/watch?v=3sGZI-aVzXE>

Poemo de Ludwig Zamenhof

Pluvo

Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas
senĉese, senfine, senhalte,
el ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
are gutoj frapiĝas resalte.

Tra la sonoj de l' pluvo al mia orelo
murmurado penetras mistera,
mi revante aŭskultas, mi volus kompreni,
kion diras la voĉo aera.

Kvazaŭ ia sopir' en la voĉo kaŝiĝas
kaj aŭdiĝas en ĝi rememoro...
Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja,
en mi batas konfuze la koro.

Ĉu la nuboj pasintaj, jam ofte vidadaj,
rememore en mi reviviĝis,
aŭ mi revas pri l' sun', kiu baldaŭ aperos
kvankam ĝi en la nuboj kaŝiĝis?

Mi ne volas esplori la senton misteran,
mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;
ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas,
al la freŝo la koro min tiras.

Pensu mem! diras Carl-Olof Selenius, Upsalo



Pensoj – penseoj

Pensu mem, kalkulu maltime kaj klarigu la mondon!

Vero aŭ fantazio? Tiom multajn asertojn ni
aŭdas pri mondaj aferoj. Kion ni kredu?
Kreskanta problemo estas, ke multaj homoj
pensas ke oni ne povas scii, nur kredi: Ĉu la
mondo estas plata? Eble. Oni rajtas kredi
tion, oni rajtas kredi ĉiun ajn. Ĉiuj opinioj
estas samvaloraj, oni ne povas eltrovi la
veron. Ne indas diskuti. Oni povas nur
akcepti. Aŭ forpuŝi aliajn opiniojn kaj
subpremi iliajn defendantojn.

Anstataŭ diskuto restos al ni nur ridaĉon aŭ
apation. Kion faru en tia situacio? Ni ja volas
klarigan diskuton, ne kritikaĉon kaj rikanon.

Stange, ĉefan rolon en tiu proceso de troa
skeptikismo ludas la nombroj. La maniero,
kiel nombroj estas uzataj en komunikiloj faras
homojn senesperaj. Jen kiajn aferojn oni
legas en gazetoj, aŭdas per televidilo,
ĉiutage:

*"Dum la jaro estis ellasitaj en la atmosferon
23 000 milionoj da tunoj da karbona dioksido
pro uzo de fosiliaj brulaĵoj."*

“La tero produktas da biomaso 55 · 10⁹ tunoj da petrolekvivalentoj ĉiun jaron.”

Sed kion diras tiaj asertoj? Ke estas multe, preskaŭ nenion pli. Malfacile estas kompreni grandajn nombrojn. Ĉu oni kredu aŭ rikanu?

Eble la informoj estas eraraj. Kelkaj, kiuj skribas en gazetoj aŭ uzas aliajn komunikilojn, ne povas bone distingi inter miliono kaj miliardo, eble eĉ opinias, ke ne gravas multe kiom da nuloj la nombro havas ĉe la fino. Ili uzas la nombrojn por paradi – aŭ por timigi.

Sed ankaŭ kiam ni renkontas nombrojn, kiuj estas fidindaj kaj ĝustaj, ni havas problemon pri ili. Ili estas tiel multegaj. Ĉu ili vere helpas nin kompreni la mondon ĉirkaŭ ni? Kelkaj legantoj klopodas parkerigi kaj memori, kion ili legas, aliaj jam konstatis, ke vane estas tio, kaj tial nur trarigardas nombrojn, rapidege, kvazaŭ ili estus nenecesaj. Kiun agmanieron ni elektu – ĉu parkeraĉan legadon aŭ indiferenton? Ĉu kredon aŭ kritikaĉon?

Feliĉe ekzistas tria maniero: Ĉiam kontrolu la ĝustecon.

– Sed mi ja ne povas kontroli kalkulojn de tiaj nombroj pri la klimato kaj la monda produktado, vi verŝajne kontraŭdiras.

Sed tion vi diras antaŭ legado de la libro “Kalkulo maltime per rondaj nombroj – proksimuma kalkulo klarigas la mondon”

https://eo.wikibooks.org/wiki/Proksimuma_kalkulo.

La libro troviĝas ĉe Vikilibroj, frata projekto de Vikipedio, projekto kiu enhavas pli longajn artikolojn, librojn.

Ĉi tiu libro temas pri aferoj kiel:

– *Ĉu nia tero povas vivteni kreskantan loĝantaron?*

– *Ĉu eblas haltigi la tutmondan varmiĝon se oni kolektas el la aero la karbonan dioksidon kaj enmagazenigas ĝin?*

Tiu libro lernigas al vi, en simpla maniero paŝon post paŝo, kontroli ĉu ciferoj prezentataj en komunikiloj estas sensencaj aŭ ne. Ĝi celas ĉiujn personojn, kiuj volas kompreni ne nur kiel sed ankaŭ kiom.

La legantoj ne bezonas aliaj antaŭajn sciojn krom la matematiko de la baza lernejo. Tiuj, kiu jam lertas pri kalkulo, povas transsalti la unuajn sekciojn, sed ankaŭ ili certe povas trovi novaĵojn en la aplikantaj ĉapitroj. Por tiuj, kiuj precipe kutimas kalkuli monon, naturscienca perspektivo estas prezentita, kaj por naturscienculoj, kiuj jam spertas pri bravaj proksimumoj, povas esti interese utiligi ilin pri gravaj sociaj problemoj.

La libro komencas per ekspliki iujn metodojn por evoluigi nociojn pri granda kaj kvanto – precipe proksimuman kalkuladon, mensan bildigadon kaj efikan uzadon de la propraj spertoj. Post tio sekvas kvindek ekzemploj de aferoj, kiujn oni povas elpensi per tiuj metodoj. Per fantazio, proksimuma kalkulado kaj per sperto, kiun oni jam havas, oni iom post iom povas sukcese fari pli kaj pli komplikajn taksojn.

Per kalkuli oni kunligas la nombrojn al aliaj informoj. Per tio nenecesa fariĝas legado celanta al parkerigo de nombroj. Luj el la nombroj estas malĝustaj, aliaj estas memevidentaj aŭ nenecesaj. Nur malmultaj donas al ni interesajn informojn, kiuj ŝanĝas niajn konceptojn – sed eĉ ili ofte ne meritas parkerigon. Oni ja povas rekalkuli ilin laŭbezone.

Ĉu oni do bezonas lerni neniujn ajn nombrojn? Tamen jes, sed sufiĉe malmultajn. Oni nur bezonas kelkajn kiel skeleton aŭ framon. El tiuj oni per kalkulo povas atingi alian scion pri kvantoj kaj grandoj.

Scii plejble malmulte – tiu povus esti konvena devizo en la nuntempa informa socio. Aŭ pli ĝuste: esti multescia per esti

malmultescia. Lerni la gravan kaj ne lasi la detalojn malhelpi la vidadon.

La diskuto ĉirkaŭ ni fariĝas per vortoj, per la lingvo, dum la nombroj, prenitaj el aŭtoritatuloj, precipe servas kiel ornamo, kiel dekoracio. Ĉar estas tiel, ni devas multe penadi por atingi kvantan sciadon, kie vortoj kaj nombroj kunlaboras por distingi inter aferoj gravaj kaj malgravaj. Pli facila la penado fariĝas, se la matematikaj nocioj estas klaraj, kun bazo en vida kaj intuicia rezonado.

La libro ankaŭ havas svedan version: <https://sv.wikibooks.org/wiki/Matematik/%C3%96verslagsr%C3%A4kning>
Studentoj de Esperanto do povas uzi ambaŭ kune por praktikado: legi la esperantan kaj kontroli la svedan, aŭ inverse.

Unu el miaj amikoj diris, post legado de la libro, ke la titolo estu "Kuraĝe pensu mem!"

Carl-Olof Selenius



Vi rekonas Carl-Olof de la raporto pri lia traduko de "La strutknabo", ĉu ne? /Siv.

La ŝlosila harpo

Kiam mi estis juna, eble mi havis dekkvar jarojn, mia kuzo Kenneth kaj mi fondis rokenrolbandon kie mi ludis per kanteleto de mia fratino dum li ludis tamburon sur malplenaj ladskatoloj. Ĝi ne sonis bone, sed laŭte. Poste mi aĉetis gitaron. Tiam mia patro opiniis ke ni ludis bone, kaj donis al mi violonon. Eble li esperis ke ĝi sonus pli mallaŭte.

Mi komencis ludi popolmuzikon kune kun samklasano, per kiu mi renkontis tre faman ŝlosilharpludiston, Ceylon Wallin de Uplando.*

Tiu okazis dum la "Verda Ondo" kaj ne troviĝis iu ŝlosilharpo por aĉeti. Do, mi mem devis konstrui harpojn, la dua harpo fariĝis bona. (Krome, mi renkontis mian venontan bopatron en la slojdoĉambro, ankaŭ li konstruis harpojn).



Estis mirinde ludi kune kun Ceylon kaj je grandaj popolmuzikaj kunvenoj tra la lando kaj en privataj kunvenoj.

La ŝlosila harpo estas tre nekutima ekster Svedio. Neniu scias kiu lando estas la devenlando. Ofte muzikaj instrumentoj venis de sudaj kaj orientaj landoj, kiel la gitaro kaj la violono. Malgraŭ tio, la plej olda eksterlanda bildo fariĝis en Siena, Italio, en la jaro 1408, dum la plej olda sveda bildo estas pli maljuna, de la jaro 1350, kaj troviĝas en la Källunga preĝejo sur la insulo Gotland en Svedio.



La ŝlosila harpo estas ludita, kiel la violono, per arĉo, kiu estas farita de ĉevalharegoj streĉita sur ligna arko. La arĉo frotiĝas transverse de la kordoj. Se la kordo estas mallonga, la tono estos alta kaj kontraŭe. Sur violono oni metas la fingron tien, kie oni ricevas la ĝustan tonon, sur ŝlosila harpo estas po unu ŝlosilo (klavo) por ĉiu dezirata tono. Sur ĉiu ŝlosilo estas eta stangeto kiu tuŝas la kordon je la ĝusta loko. Tiuj stangetoj nomiĝas "folietoj".

La plej kutima aranĝo por kordoj kaj ŝlosiloj estas:

– tri ludkordoj kun ŝlosiloj por ĉiuj duontonoj je respektiva kordo

– unu basa ludkordo sen ŝlosiloj, borduno
– dekdu resonancaj kordoj

La ŝlosila harpo sonas laŭte, ĉar la resonancaj kordoj akompanas kiam estas resonanco kun la luditaj tonoj, kaj krom tio, oni ofte ludas sur du aŭ tri ludkordoj samtempe.

Estas diversaj specoj de ligno en la ŝlosila harpo:

La flankoj estas faritaj el alno, la kolo el pino, la kovrilo el abio.

La fundo, la ŝlosiloj kaj la folietoj estas faritaj el acero.

La platoj, sur kiuj la kordoj estas streĉitaj, nomigas "selo" kaj "stalo", kaj estas faritaj el kverko respektive acero.

Lasse Granat



*) "Ŝlosila harpo" estas rekta traduko el la sveda, ĉar ni ne trovis tradukon por *nyckelharpa* en esperanto. Eble la traduko povus esti klavoviolono. *Red.*

Dek ses tunojn – Olivier Tzaut

Inga trovis ĝin: <https://sites.google.com/site/oliviertzaut/home/tra-mondo/dekses-tunojn>

Oni diras, ke homo fariĝis el kot',
sed homo konsistas en karno kaj ost',
sango, muskoloj, nervoj kaj haŭt'
kun cerbo vakua kaj kun dorsa fort'.

Ŝarĝi dek ses tunojn, por kio do?
Ŝuldi plian monon dum mi ŝuldas jam tro.
Ne voku! Mi ne povus eliri for.
Ne mia estas eĉ la propra kor'!

Mi naskiĝis matenon kiam ŝtormis la vent',
mi vivis junecon en ŝtorma turment'.
Elfosas mi karbon, ŝovelas en rok'.
Min trafas kompense nur insulta vok'.

Ŝarĝi dek ses tunojn, por kio do?
Aĝi plian tagon dum mi aĝas jam tro!
Ne voku! Mi ne povus eliri for.
Ne mia estas eĉ la propra kor'!

Rapidu flanken dum mi venas el tru'!
Ĝin kelkaj ne faris kaj ne vivas plu.
Pugno el fero, alia el ŝtal',
Jes, ambaŭ bonegas por la venĝbatal'!

Refreno...



Solidareca Bonvolo

Unue laŭ Vikipedio:

Solidareca Bonvolo (SBV) estas bonfara agado funkciigata de esperantistoj en la kongolanda urbo Goma, kiu situas en la orienta provinco Nord-Kivuo proksima al Ruando. Ĝi provizas edukajn, sanigajn kaj aliajn servojn al la komunumo, kiu suferas la severajn sekvojn de la multjare jam daŭranta militado en la regiono. Interalie ĝi funkciigas orfejon, subtenas la edukadon de 25 bazlernejaj infanoj, 31 mezlernejaj infanoj kaj 13 universitataj studentoj, kaj helpas akiri medicinajn servojn por bezonantoj. Entute 68 personoj estas subtenataj, inkluzive tri vidvinajn familiojn.

La organizaĵon fondis Alexis Asumani Bengantundu, kiu ne plu estas ĝia prezidanto.

En 1998 li komencis sian laboron por orfoj. La agadon nun direktas la advokato Alphonse





Waseka. Ĉiuj membroj de la asocio parolas Esperanton, kiun oni ankaŭ instruas al la lernejinfanoj. Parto de la financado venas de subtenantoj ekster Kongolando. /Siv

Kaj nun nun klarigo de Alphonse Waseka Kamango:

Saluton, gekaraj de Sveda Eo-asocio,

Mi nomiĝas WASEKA KAMANGO Alphonse el urbo Goma/Kongolando Demokratia. Vian adreson mi havis el via retejo sed ankaŭ danke al Siv Burell ĉe FB. La plano estis, ke mi verku ion por publikigi en via monata ĵurnalo... Mi maltrafis tiun okazon.

Tamen mi verkis alian pri la agado nia asocio. Tiam mi volas konigi ĝin al la Esperantujo de via grupo. Ĉu vi interesiĝas? Jen alĉroĉite la artikolon verkitan de mi.

Amike,

WASEKA KAMANGO Alphonse +243
990428340FB: Solidareca Bonvoloj
www.bonvolo.net

Alphonse Waseka Kamango skribas:

ESPERANTO LINGVOKOMUNIKILO POR KELKAJ
SED ILO POR ESPRIMI SIAN KORON POR ALIAJ
KAJ PACAN LINGVON.

D-ro L. Zamenhof kreis por la homaro lingvon « Esperanto ». Tiu ĉi estas uzata diversmaniere laŭ grupoj da homoj. Estas tiuj, kiuj pensas, ke

ĝi estas simpla komunikilo sed alia grupo, eble geografie kredas, ke Esperanto ne estas nur komunikilo sed pontlingvo, kiun homoj uzas por esprimi sian koron. Filozofie, ambaŭflanke, ĉiuj kredas, ke Esperanto estas paca lingvo. Laŭ mi, la graveco de Esperanto situas en sia paca karakterizo. Se ĉiuj lingvoj, parolataj preskaŭ tra la mondo kaŭzis malpacon, Esperanto plene respektas la kulturon de aliaj lingvoj. Ĉar ĝi ne detruas aliajn lingvojn sed respektas ilin, lasante la uzadon al la alproprigantoj kaj simple ebligas komunikadon kun fremduloj kiuj ne scipovas paroli fremdajn lingvojn.

Ankaŭ, eble tio estas nur mia individua sento, sed mi sentis, ke Esperanto alproksimigis min al multaj homoj. Ĉiufoje kiam mi renkontas Esperantiston, mi sentas grandan ĝojon. Jen Esperanto aperas vere Amika lingvo. Neniam mi vidis tian alproksimiĝon inter parolantoj de aliaj lingvoj (ĉu Angla aŭ Franca aŭ Hispana, Ĉina ktp). En Afriko, gejunuloj lernas multajn Okcidentajn lingvojn (Anglan, Hispanan, Francan ktp) kun espero, ke ili vojaĝos en Hispanaj landoj, Anglaj aŭ Francaj. Bedaŭrinde malgraŭ tia granda espero kaj sopiro, mi pensas, ke eble nur 3% vere profitis de tio. Eble mi ignoras, vere mi ne vidis grupojn kun entuziasmo je amikeco inter anglaj parolantoj aŭ francaj ktp. Kion ili faras estas plipolitike kaj ekonomie. La originaj parolantoj de tiuj cititaj lingvoj ne servas iliajn samparolontajn sed bedaŭrinde ekspluatas ilin kaj kruele kaŭzas malpacon en la supozitaj samlingvaj parolantoj.

Sed kiu ne havas specifan landon, la Esperantujo prizorgas unu la alian per la amikeco. Neniu sentas veran ŝokon.

Tiel kreiĝis senprofitcela asocio nomata Solidareca Bonvolo, SBV mallonge aŭ Franclingve Solidarité Bonne Volonté, SBV. Kreita iniciate de sroj Alexis ASUMANI

BENGANTUNDU kaj WASEKA KAMANGO Alphonse (2004), leĝe registrita sub la numero N°

JUST/20/1609/2014, N°F.92/22/937,

Solidareca Bonvolo, SBV celas la edukadon de infanoj/gejunuloj, orfoj/stratinfanoj el malriĉaj familioj, la disvastigon de

Esperanto, la disvastigon de la Homaj Rajtoj laŭ la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj de 1948, la Batalon kontraŭ la malriĉecon.

Historie, SBV estis nomata "Goma Esperanto Klubo" (2003) sed post ĝi fariĝis senprofitcela asocio "Solidareca Bonvolo".

Gravajn atingojn faris Solidareca Bonvolo, SBV danke al subteno de la Esperantujo tra la mondo. Tio pruvas kiom Esperanto ne estas simpla komunikilo aŭ pontlingvo sed ankaŭ ilo por esprimi sian koron.

Menciinda afero estas, ke dum tiu ĉi asocio faris gravajn atingojn, sed en la jaro 2018 (Aprile) ĝi travivis sian tre malbonan momenton kiu kreis konfuzon ene de ĝi. Pro miskompreno kaj eble individuaj interesoj okazis dissplitiĝo de la asocio, kvar membroj foriris kaj bedaŭrinde gardis la saman nomon Solidareca Bonvolo, kiun siatempe oni erare nomis « Solidareco Bona Volo ».



Tre bedaŭrinde la afero estas, ke tiuj ĉi foririntoj ne plu restadis kune sed denove disiĝis. Sro Alexis ASUMANI BEGANTUNDU unu el la kreinto de SBV kun sia edzino Jeanne nuntempe havas propran asocion nomata Solidareca karitato kaj **Augustin KAKOZWA** kreis propran asocion «**Nova Familio**» dum

WASEKA KAMANGO

Alphonse elektita prezidanto de SBV antaŭ sia displitiĝo kaj aliaj ses membroj restis en la malnova Solidareca Bonvolo.

La dissplitiĝo de SBV malpurigis sian reputacion kaj kreis konfuzon al la subtenintoj. Tamen, bv vidi atingojn de SBV de la komenco

ĝis nun. Pri la edukado, SBV jam ebligis akiradon de dek universitataj diplomoj. Jen la diplomitoj kaj iliaj subtenitoj: Lucie Yohali M, diplomito kreis konfuzon al la subtenintoj.

Tiu ĉi projekto daŭras. Ekde meze de Junio 2020, SBV per sia grupo Mama Wimbi (MW), starigis projekton je kudrado de uniformoj kaj dorsosakoj. Tiuj ĉi estos vendataj surloke kaj la enspezoj servos por la edukado de SBV-beneficuloj.

Kompreneble, por ke SBV stariĝu en fortaj radikoj, ni ja bezonas subtenon de la Esperantujo. Same por la edukado, la disvastigo de Esperanto, la pluirado de MW-laboro kaj la batalo kontraŭ la malriĉeco.

Se vi volus subteni la projekton, faru kontakton kun WASEKA KAMANGO Alphonse, Manaĝero +243 990428340, 810429940 alphonsewaseka@yahoo.fr www.bonvolo.net FB: Solidareca Bonvolo.

”La voĉo de la surda lingvo” gajnis la premion

de la minoritataj lingvoj en 2020 de la instituto por Lingvoj kaj Popolaj Memoraĵoj
Institutet för språk och folkminnen (Isof)



La ĉefdirektoro de Isof donas diplomon al Isabel Engwall, unu el la fondintoj de La voĉo de la surda lingvo.

La societo ”La voĉo de la surda lingvo” laboras pri antaŭjuĝoj koncerne lingvajn kondiĉojn de surduloj kaj aŭddifektitoj.

En tiu konekso ne nur la naciaj minoritataj lingvoj (la finna, la jida, meänkieli, romea kaj la samea lingvoj) estas enkalkulitaj, sed ankaŭ la koncernaj lingvoj havas la saman statuson.

En videa saluto la ministro pri **kulturo kaj demokratio Amanda Lind** laŭdas la ricevinton de la premio.



I.a. ŝi diris: Mi esperas ke la rajto uzi la surdlingvon estos eĉ pli atentata.

https://www.youtube.com/watch?v=8RVZD_XYBo8&feature=emb_logo

Ho, belulin' !


Du versioj de "Bela ciao" 1) en esperanto: Ho Belulin', 2) en la surda lingvo.

Inga trovis ilin!



<https://www.youtube.com/watch?v=Kixxwejn2Kk>

<https://www.youtube.com/watch?v=ETd6DRvSkVc>



Kultura Esperanto-Festivalo 2022 en Svislando

La Komitato de Kultura Centro Esperantista, kunsidanta en Ĉaŭdefono 25 oktobro 2020, unuanime aprobis la kunlaboron kun Studenta Esperanta Ligo por organizi la 11an Kulturajn Esperanto-Festivalon en Svislando, meze de aŭgusto 2022.

La teamo konsistas el ĝec-anoj Ariele Baldrati (muzika kaj teknika helpoj), Anna Bartek (aliĝoj, arkivo, loĝiga servo, librotenado), Manuela Blanco (kunvokanto, rilatoj kun la artistoj, invitoj), Alessio Giordano (konfirmenda – blogo pri KEF, sociaj retoj), Perla Martinelli (grafiko), Annina Naeder (fotografado dum KEF), Abasi Nshimirimana

(partopreno de afrikanoj), Giorgio Silfer (rilatoj kun la KEFejo, lokaj aŭtoritatoj, permesoj, subvencioj).

STELO havas la ĉefan organizan respondecon, sed KCE responsas pri eventualaj kontraktoj. La evento daŭros kelkajn tagojn kaj estos malfermita al neesperantistoj; ĝi okazos tuj post loka spektakla festivalo en Ĉaŭdefono.

KEF disvolviĝos unuafoje ekster Skandinavio, fakte jardekon post la lasta. Ĉiuj artistoj el Esperantio estos bonvenaj.

[HeKo 746 3-B, 27 okt 20]

/Bertil Nilsson sendis la informon.

Mireille Grosjean: ILEI-kongreso

Hibrida Kongreso de ILEI en Edinburgo, Skotlando, Unuiĝinta Reĝlando. 10–17 julio 2021.

Rezervu la daton!

Ni esperas, ke kelkaj personoj povos atingi la urbon kaj ĉeesti fizike la semajnon. Ni zorgos, ke teknikistoj sendu la registradon de niaj kunvenoj kaj prelegoj al la tuta mondo, tiel ke de for multaj esperantistoj povu partopreni.

Se vi kompetentas pri tekniko, bonvolu kontakti la Ligon, ĉar la Estraro jam planis senpagan restadon en Edinburgo por du personoj.





Edinburgo.

Celo de Eŭropa televidkanalo en Esperanto

Roberto Poort el Facebook:

Temas pri franca anonco de politika partio en Eŭropo (EDE), kiu enhavas en sia partioplano, celon pri eŭropa televidkanalo en Esperanto. Bonega ideo, malfacile atingebla. Ni invitas ĉiujn al ampleksa dialogo tiucele!

STUDIO – radio kaj televido en Esperanto – invitas ĉiujn Esperantistojn al dialogo pri kiel atingi tiun celon, ne nur en Eŭropo, sed pli

ĝenerale en la tuta mondo, per ret-televido en Esperanto. Multaj Esperantistoj fakte jam kontribuas al tian disvolviĝon per multegaj elstaraj ekzistantaj iniciatoj, kaj STUDIO integras multajn en sia programaro. Bonvolu dividi viajn pensojn kaj proponojn cele al grandskala kunlaborado!

<http://novajhoj.weebly.com>

<https://www.facebook.com/Esperanto.../posts/2846736108904100>



Rezultoj de la Internacia Esperanta Literatura Konkurso "HRISTO GOROV"



En 2020 Bulgara Esperanto-Asocio sepan fojon organizis la Internacian Esperantan Literaturan Konkurson "Hristo Gorov – Hrima". La konkurso estas tradicia kaj en ĝi partoprenas Esperantaj aŭtoroj el diversaj landoj.

Ĉijare en la literatura konkurso partoprenis Esperantaj verkistoj el **Brazilo, Francio, Irano, Kongo, Rusio, Litovio, Ĉeĥio, Turkio, Germanio, Rumanio, Italio, Britio, Tanzanio, Tajvano, Armenio, Pollando, Slovakio, Ukrainio, Nov Zelando, Bulgario**. Ili sendis 17 rakontojn kaj 8 eseojn.

Organizanto de la konkurso estas Maja Gorova, vicprezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio, filino de Hristo Gorov.

Anoj de la ĵurio estas: Georgi Mihalkov – Bulgario, Laure Patas d'Illiers – Francio kaj Venelin Mitev – Bulgario.

Premioj:

Por originala rakonto en Esperanto

Unua premio: Ke vi povu vivi en interesaj tempoj – Massimo Acciai Baggiani – Italio

Dua premio: Opera kantisto – Georgi Marinov Mihajlov-Bulgario

Tria premio: Ni ne frotu la vitron! – William Graig – Nov-Zelando

Por originala eseo en Esperanto

Unua premio: Ĉu la interna ideo de Esperanto ŝanĝiĝas dum la 21 a jarcento – Paulo S. Viana – Brazilo

Dua premio: En defendo de la naturo – Stanislaw Polanowski – Pollando

Tria premio: Esperanto kaj Naturo – Tatjana Auderskaja

La gajnintoj ricevas valorajn premiojn.

La Internacia Esperanta Literatura Konkurso "Hristo Gorov – Hrima" elokvente montras, ke la originala Esperanto-literaturo estas tre grava por la Internacia Lingvo. La geesperantistoj el la tuta mondo ne nur ŝatas la literaturon, sed multaj el ili kreas valorajn Esperantajn verkojn.

Georgi Mihalkov – prezidanto de la ĵurio

Sten Johansson: Sesdek ok

Originala romano en Esperanto



ISBN 9781595694126

186 paĝoj. Mole bindita libro. 21,5 cm × 14 cm.

Priskribo: La jaro 1968 estis eventoriĉa jaro, plurloke en la mondo: En Usono pliaktiviĝis la fortoj kontraŭ la milito de la usona registaro en Vjetnamio, kaj en Ĉeĥoslovakio la t.n. Praga Printempo unue ekfloris kaj poste en la sama jaro estis disbatita de la armeoj de la Varsovia Pakto. La romano mencias ambaŭ okazaĵojn, sed koncentriĝas sur tria tumulto evento: la ribeloj de la studentoj en Parizo.

Tra la okuloj de juna sveda esperantisto studanta francan literaturon en Parizo, la aŭtoro prezentas la tiutempan socian situacion en Francio kaj interplektas siajn priskribojn kun aferoj de interhomaj rilatoj, de amo kaj amoro, kiujn li lerte uzas kiel ilustraĵojn de diversaj politikaj movadoj kaj individuaj konvinkiĝoj.

Sten Johansson (nask. 1950) estas sveda aŭtoro de pli ol 20 originale verkitaĵoj libroj en Esperanto – ĉefe romanoj kaj rakontoj. Li ankaŭ tradukas en Esperanton kaj verkas en

la sveda. La multifaceta romano *Sesdek ok* estas la oka libro de Sten Johansson aperinta ĉe Mondial.

Aĉetu papere ĉe: UEA / Mondial / Abebooks / Alibris / Amazon.com / Amazon.co.uk / Amazon.de / Amazon.ca / Amazon.jp / Amazon.es / Amazon.fr – aŭ uzu la supran ISBN-numeron aŭ la libro-titolon por serĉi ĉe alia reta librovendejo.

Aĉetu elektronike ĉe: Smashwords / Google Books.

Greta Thunberg skribas al Donald Trump en Twitter

Donald Trump antaŭe ridindigis Greta Thunberg. Nun Greta sendas ŝercan admonon al li (reuzante la vortumojn kiujn li uzis al ŝi):

”Ridinde! Donald devas strebi regi siajn agresojn kaj poste iri al kinejo por spekti malnovtempan filmon kune kun amiko. Ne maltrankviliĝu, Donald, ne maltrankviliĝu!” Greta skribas en Twitter.



Bertil Nilsson informas pri la Konsilio de Eŭropo



La bildo pri Bertil devenas de fojo, kiam li prezentis ŝatatan libron.

Hej Siv, som du säkert vet så presenterade en ledande person i Svenska Esperantoinstitutet (tyvärr har jag glömt hans namn) för några år sedan Europarådets plan att upprätta en jämförbar testning av färdigheterna i olika språk.

Esperantovärlden dök in i detta från två håll: ett ungerskt universitet med Katalin Kováts som drivande kraft och från ett annat håll agerade Kultura Centro Esperantista i Schweiz. Båda har deltagit i ALTEs

sammankomster. (ALTE = Association of Language Testers in Europe).

KCE har nu blivit vad vi på svenska skulle kalla remissinstans för Europarådet och hade som sådan igår ett seminarium i Schweiz enligt nedanstående.

*Hälsningar,
Bertil*

La Esperanta Civito invitita de Konsilio de Eŭropo

La Esperanta Civito formale kunlaboras kun la Konsilio de Eŭropo, laŭ ĝia invito kaj pere de Kultura Centro Esperantista, kiu estas unu el la dekelkaj institucioj oficiale komisiitaj de Strasburgo por analizi la preparatan dokumenton pri lingvotestado por enmigrintoj, rifuĝintoj, azilpetantoj.

Hieraŭ okazis telematika kunveno inter Strasburgo kaj parto de la komisiitoj, kiun partoprenis por KCE gec-anoj Lorena Bellotti kaj Giorgio Silfer. Ili atingis la konsenton ke, kvankam la baza dokumento estas skribita kaj modifebla nur en la angla, ĉiu aparta laborgrupo diskutu en sia lingvo, kaj konsekvence la nia uzos esperanton kiel intralingvon!

Dudeko da esperantlingvaj fakuloj kunvenos en la Esperanto-Domo en Svislando, parte fizike parte telematike, dimanĉon la 8an de novembro, por analizi la dokumenton kaj proponi eventualajn modifojn, sub la gvido de d-ino Bellotti. Inter ili estas jamaj okupiĝintoj pri migrofluoĵ ĉe alia paktinto (Itala Interlingvistika Centro), ekzemple c-ino Tiziana Rogora, eksministro pri laboro, profesia trejnado kaj migrofluoĵ de Regiono Lombardio.

[HeKo 746 3-B, 27 okt 20]

La Civito kunlaboras pri migrantoj kun Konsilio de Eŭropo

Per la admirinda reĝisorado de c-ino Lorena Bellotti eŭropaj fakuloj de la Esperanta Civito, selektitaj tra Kultura Centro Esperantista, realigis hodiaŭ parte realan kaj parte virtualan seminarion, laŭ komisio kaj financado de ALTE kaj Konsilio de Eŭropo, pri LASLLIAM (esperantigebla al "La Alfabetigo kaj Sekundara Lernado por la Lingva Integriĝo de Adoltaj Migrantoj").

"Estis mia unua sperto en retseminario, kaj mi multe ŝatis ĝin, malgraŭ la limoj de la teknologio" komentarias c-ino Marie-France Conde Rey, vickonsulo pri klerigado kaj gvidantino de unu el la studgrupoĵ kiuj analizis la priskribiloĵ proponitajn por LASLLIAM. "Interalie ne eblis por la fizike alestantoĵ resti en la sama salono, pro la 'faduado' de komputiloĵ dum la Zoom-sesio: bonŝance la kvaretaĝa Esperanto-Domo de Svislando proponas multe da ĉambroj; sed estas kurioze ke la homoj devas trudizoli sin eĉ kiam ili povus paroli unu al la alia samloke".

La seminario ĉe KCE estas unu el la dek sep akceptitaj de Konsilio de Eŭropo, kiu konsentis ke la diskutoĵ okazu en la respektivaj naciaj lingvoĵ, kaj unuafoĵe akceptis tian statuson ankaŭ por esperanto. Tiu nereкта agnosko cetere ne estas la unua ĉe KdE: la faldfolio pri LASLLIAM jam ekzistas en esperanto, per la traduko de c-ano Giorgio Silfer.

(Legu pli en "Heroldo de Esperanto", organo de KCE)

[HeKo 747 3-C, 8 nov 20]

Hundo sen mastro

(1894)



El la sveda esperantigis Sten Johansson.

La originalo kun la titolo *En herrelös hund* aperis en la kolekto *Historietter el 1898*.

La Esperanta traduko aperis en la kolekto *La kiso kaj dek tri aliaj noveloj, Al-fab-et-o 1995*.

VIRO MORTIS, kaj post lia morto neniu prizorgis lian nigran hundon. La hundo longe kaj amare funebris pri li. Ĝi tamen ne kuŝiĝis por morti sur la tombo de sia mastro, eble pro tio ke ĝi ne sciis kie tiu troviĝas, eble ankaŭ pro tio ke ĝi esence estis hundo juna kaj gaja, kiu ankoraŭ ŝajnis havi konton por reguligi kun la vivo.

Troviĝas hundoj duspecaj: tiaj kun mastro, kaj tiaj sen mastro. Laŭ la eksteraĵo tiu distingo ne gravas; senmastra hundo povas esti same grasa kiel la aliaj, ofte eĉ pli grasa. Ne, la diferenco troviĝas aliloke. Por hundo la homo signifas eternon, providencon. Mastron obei, sekvi, fidi: jen por tiel diri la senco de hunda vivo. Estas vere, ke ĝi ne dum ĉiu minuto de la tago pensas pri sia mastro, kaj ke ĝi ne ĉiam akompanas lin ĉekalkane; ne, ĝi ofte vagas tute sola kun afereca mieno dum ĝi priflaras domangulojn, ligas rilatojn kun siaj samspeculoj kaj kaptas oston, se tiel eblas, kaj zorgas pri multo; tamen en la momento kiam ĝia mastro fajfas, ĉio ĉi malaperas el ĝia hunda cerbo pli rapide ol kiel skurĝaj batoj elpelis la vendistojn el la templo; ĉar ĝi scias, ke unu afero estas necesa. Kaj ĝi forgesas sian domangulon kaj sian oston kaj siajn kompanojn kaj rapidas al sia mastro.

Tiu hundo, kies mastro mortis en maniero kiun la hundo ne sciis, kaj estis entombigita en loko kiun la hundo ne konis, dumlonge funebris pri li; sed kiam pasis tagoj kaj nenio okazis, kio povus memori ĝin pri la mastro, ĝi forgesis lin. En tiu strato, kie ĝia mastro iam loĝis, ĝi ne plu flaris la odoron de liaj spuroj. Kiam ĝi ludis sur herbejo kun amiko, ofte fajfo tranĉis la aeron, kaj sammomente la amiko malaperis kiel vento. Tiam ĝi streĉis la orelojn, sed neniu fajfo similis tiun de ĝia mastro.

Do ĝi forgesis lin, kaj ĝi forgesis ankoraŭ ion: ĝi forgesis ke ĝi iam havis mastron. Ĝi forgesis, ke iam ajn estis tempo, kiam ĝi ne konsiderus ebla por hundo vivi sen mastro. Ĝi iĝis hundo pri kiu direblus, ke ĝiaj bonaj tagoj forpasis, kvankam nur en senco interna, ĉar pri mondaĵoj ĝi sufiĉe prosperis. Ĝi vivis tiel, kiel hundo povas vivi: ĝi foj-foje ŝtelis bonan tagmanĝon sur la vendoplaco kaj ricevis bastonadon, kaj havis amaferojn, kaj kuŝiĝis por dormi kiam ĝi laciĝis. Ĝi akiris amikojn kaj malamikojn. Iutage ĝi zorge tanis la haŭton de hundo pli malforta, alitage ĝi mem estis grave taŭzita de alia, pli forta.

Frumatene oni povis vidi ĝin kuri malsupren laŭ la strato de sia mastro, kie ĝi pro kutimo ankoraŭ plej ofte restadis. Ĝi kuras rekte

antaŭen kun mieno kvazaŭ ĝi havus ion gravan por plenumi; pasante priflaras hundon renkontatan, sed ne zorgas daŭrigi la konatiĝon; poste ĝi rapidiĝas, sed subite sidiĝas por grati sin malantaŭ orelo kun flamiĝanta energio. En la sekva momento ĝi eksaltas kaj flugas trans la straton por peli ruĝan katon tra kela truo, post kio ĝi kun rekonkerita mieno afereca pluiras sian vojon kaj malaperas post domangulo.

Tiel pasis ĝia tago, kaj jaro proksime spursekvis jaron, kaj ĝi maljuniĝis sen tion rimarki.

Poste do alvenis vespero nuba. Estis humide kaj malvarme, kaj iam-tiam ekpluvis. La maljuna hundo dum tuta tago vagadis longe for en la urbo; ĝi malrapide supreniris la straton, ĝi iomete lamis; foj-foje ĝi haltis por skuegi sian nigran felon, kiu kun la jaroj grizmiksiĝis ĉirkaŭ la kapo kaj kolo. Laŭ sia kutimo ĝi flaris jen dekstre, jen maldekstre; poste ĝi deviis sub pordegan volbon, kaj kiam ĝi revenis el tiu, alia hundo ĝin akompanis. Sekvamomente aperis ankaŭ tria. Ili estis hundoj junaj kaj ŝercemaj, kaj ili volis logi ĝin al ludado; sed ĝi estis malbonhumora, kaj krome komenciĝis pluvego.

Tiam fajfo tranĉis la aeron, longa kaj akra fajfo. La maljuna hundo rigardis la du junajn,

sed ili ne atentis; fajfis neniu el iliaj mastroj. Tiam la maljuna senmastra hundo streĉis la orelojn; ĝi subite sentis sin tre stranga. Jen ankoraŭ fajfo, kaj la maljuna hundo perplekse saltis jen unuflanken jen aliflanken. Fajfas ĝia mastro, tiam ĝi ja devas obei! Triafoje iu fajfis, same persiste kaj akre. Kie li do estas, kiudirekte? Kiel tio okazis, ke mi disiĝis de mia mastro? Kaj de kiam ni disiĝis, de hieraŭ aŭ de tri tagoj aŭ eble de momento? Kaj kiel aspektis mia mastro, kaj kian odoron li havis, kaj kie li estas, kie li estas?

Ĝi kuris en rondoj priflarante ĉiujn preterpasantojn, sed neniu estis ĝia mastro, kaj neniu volis esti tia. Tiam ĝi turnis sin kaj kuris malsupren laŭ la strato; ĉe domangulo ĝi haltis por rigardi ĉirkaŭen ĉiudirekte. Ĝia mastro ne estis tie. Tiam ĝi galope rekuris laŭ la strato; koto ŝprucis de ĝi kaj pluvakvo fluis de ĝia felo. Ĉiungule ĝi haltis, sed nenie troviĝis ĝia mastro. Tiam ĝi sidiĝis en stratkruciĝo, streĉis sian hirtan kapon al la ĉielo kaj hurlis.

Ĉu vi iam vidis, ĉu vi iam aŭdis tian hundon forgesitan, senmastran, kiu streĉas sian kolon al la ĉielo kaj hurlas, hurlas? La aliaj hundoj malrapide fortrotas kun la vosto inter la kruroj; ja ili ne povas konsoli nek helpi.

Aŭtunaj hajkoj

Sur la velkinta branĉo
eksidis korniko –
estas aŭtuna vespero

Bashō

La eta knabino
sidas sola kaj manĝas
en la aŭtuna vespero

Shōhaku

Sovaĝa ansero, sovaĝa ansero
kiom aĝa vi estis
en via unua vojaĝo?

Issa

Aŭtuna luno –
sur mia kana mato
kuŝas ombro de pino

Kikaku

